

SCIENCA REVUO, oficiala organo de ISAE  
Vol. 36 (1985), n-ro 1 (149): esperantologia kajero

Eldonanto: Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)  
Ĉefredaktoro: RNDr. Josef Kavka, CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha 6 — Vokovice, Ĉeĥosl.  
Grafika redaktoro: Bruĉjo Kasini, «Edistudio», c. p. 213, I-56100 Pisa, Italujo  
Administranto por la pagipovaj landoj: «Edistudio», pĉk 12230561, Italujo  
Administranto por la nepagipovaj landoj: Dr. Václav Hník, CSc., Fakulta architektury ČVUT, Thákurova 7 — CS-166 34 Praha 6 — Dejvice, Ĉeĥoslovakio  
Kompostis: «Composit», via Giordano Bruno 8, I-56100 Pisa, Italujo  
Enpaĝigis: «Edistudio», c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo  
Presis: Tecnostampa coop r.l., Pisa, Italujo

### Reguloj por la aŭtoroj:

1. Verki laŭeble pri sia propra originala esplorado tiel, ke ĝin komprenu eĉ alifakaj sciencistoj;
2. Sendi al la ĉefredaktoro la tekston en 2 ekzempleroj, klare tajpitaj sur maldika papero;
3. Maŝinskribi normallitere en la tajp-areo de 165 mm × 250 mm, kun la liniado 1<sup>1</sup>/<sub>2</sub>, t.e. kun 40 linioj surpaĝe;
4. Ĉiun vorton neesperantan substreki ondlinie (por la kursiva komposto), dum rektlinia substreko signifas komposton dikliteran;
5. En la teksto noti lokojn, kie troviĝu eventualaj figuroj;
6. Ne forgesi referenc-liston;
7. Aldoni koncizan resumon en sia gepatra lingvo.

### Estraro de ISAE:

Prezidanto: Prof. D-ro Carl Stöp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, N- Oslo 2, Norvegio  
Vicprezidantoj: Prof. Sin'itirō Kawamura, 424-7 Kinasityō Huzii, Takamatu, 760, Japanio  
Prof. Vasil Peevski D-ro hc., Gogol 9, BG-1504 Sofja, Bulgario  
Ĝenerala sekretario: Ing. Christian Darbellay, Jostenallee 45, D-4040 Neuss 1, FRG  
Sekretario-kasisto: Prof. Paul E. Kustaanheimo, Danmarks Tekniske Højskole, 040 DIA-E, DK-2800 Lyngby, Danlando  
Aliaj estraranoj: S-ro Rüdiger Eichholz, direktoro de TC-ISAE, R.R.I, Bailieboro, Ontario, KOL 1B0, Kanado  
D-ro W.A. Verloren Van Themaat, direktoro de IC-ISAE, Volkerakstraat 38f, NL-1079 XT Amsterdam, Nederlando  
D-ro Josef Kavka CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha 6 — Vokovice, Ĉeĥoslovakio  
S-ro Bruĉjo Kasini, c. p. 213, I-56100 Pisa, Italujo  
D-ro Václav Hník CSc., Podjavorinské 1609/6, CS-149 00 Praha 4 — Chodov, Ĉeĥoslovakio  
D-ro Gerhard Kalckhoff, Schuckertstraße 14/XI, D-8000 München 70, F.R. Germanio

## Provizora regularo por esperantigo de germanaj onomastikaĵoj

Rikardo Ŝulco (Germanio)\*

### 1. Antaŭrimarko

Nur invitita, ne el propra iniciato, mi ekpaŝas sur terenon, pri kiu mi sentas min apenaŭ kompetenta, certe ne pli ol aliaj Esperanto-verkistoj. Kaj en fonetiko kaj en la etimologio de personaj kaj lokaj nomoj (onomastikaĵoj) mi estas nur meze klera homo, nur laiko. Ĝis nun mi simple sekvis la opinion de Zamenhofo, kiu diris, ke “la fina formo por la skribado de nomoj estas sendube la ortografio fonetika”. Mi esperantigis la nomojn, kiujn mi uzis en miaj skribaĵoj, kaj mi esperantigis ilin kvazaŭ de okazo al okazo, ĉiam traktante ĉiun unuopan nomon kiel individuecan aferon. Neniam mi intencis absolutigi iun procedon, krei ĝeneralajn regulojn, nek intencis altrudi la de mi proponitajn formojn al la esperantistaro. Mi kreis ilin por difinita celo. La juĝo pri ilia taŭgeco por ĝenerala uzo devas resti rezervita al la konsumantoj. Ties aprobo aŭ malaprobo fine decidus.

### 2. Tezaro

Precipa elirpunkto de la esperantigo estu la germana prononco (elparolado), ĉar lingvo unuarange estas parola fenomeno. La germana ortografio laŭbezone nur helpu por eviti malfacile prononceblajn formojn aŭ homonimojn aŭ nur tro strangajn, por la okulo tro malkutimajn ortografiaĵojn. Tio kondiĉas, ke la procedo ne povas esti nur ŝablona. Certagrada libero devas resti, precipe en malfacile esperantigotaj okazoj. En ili artisma kreado devas anstataŭi nunan tro striktan laŭregulan formadon. Celu devas esti esperantigita formo agrable prononcebla kaj bone komprenebla. Estiĝo de duoblaj aŭ eĉ pluroblaj formoj ne endanĝerigas la unuecon de la lingvo. Ili prezentas al la esperantistaro la eblecon de elekto. La evoluo de la lingvo konservas la plej taŭgan formon, eliminis la aliajn. Kiel bazo de la esperantigoj estas priatentenda ne la ĥaosa multeco de la efektive parolata lingvo, sed la normi-

\* Richard Schulz, gimnazia profesoro pri latinidaj kaj germana lingvoj en Hamburgo, nun emerito, Weserstrasse 8, D-4950 MINDEN (BRD).

gita prononco de la germana “altsoneco” (*Hochlautung*) t.e. de la germana sceneja aŭ podia prononco (*deutsche Bühnenaussprache*).

### 3. La germanaj vokaloj

Ekzistas en la modela germana lingvo tridek-tri vokaloj, nome dudek-du buŝaj monoftongoj kaj ok nazaj monoftongoj (kiuj tamen nur troviĝas en francdevenaj vortoj) kaj tri diftongoj.

La tri *i*, longa fermita, mallonga fermita kaj mallonga malfermita, fariĝas en Esperanto *i*.

La kvin *e*, longaj fermita kaj malfermita, mallongaj fermita kaj malfermita, kaj la senakcenta murmurata, fariĝas *e*.

La du *a*, longa kaj mallonga, fariĝas *a*.

Apartan malfacilon prezentas la tri *ü*, longa fermita, mallonga fermita kaj mallonga malfermita. Mi apenaŭ kuraĝus doni firman regulon por ilia esperantigo. Ilia anstataŭigo per *u* aŭ *i* malmulte kontentigas. Kelkfoje konvenas enŝovado de palataliga *j*. En antaŭaj publikigaĵoj mi ekz. esperantigis *Zündach* per Cujndaĥo, *Düsseldorf* per Dujselfdorfo, *Hüften* per Huftjeno, *Lüding* per Lujdingo, *Lüstra* per Lujŝtro, *Lüneburg* per Lunjeburgo, *Büddenstedt* per Budjenŝtedo, *Kissenbrügge* per Kisenbrugjo, *Ützen* per Uĉjo, *Uelzen* per Ulĉjo, *Wolfenbüttel* per Volfenbutjelo. Mi tamen uzis laŭ PIV la en Esperanto enhejmiĝintajn formojn Munkeno, (zamenhofe: Munĥeno) Lubeko, Nurenbergo, Turingujo kaj Turko.

Analoge oni devus trakti la tri germanajn *ö*. Ankaŭ la *ö* estiĝis per influo de iu senpere sekvanta aŭ en la posta silabo sekvanta *j*. Oni pensu ekz. pri *Kölln (Cologne)* = Kolonjo. Esperantigi *ö* per *o* aŭ eĉ per *e* estas nek fonetike nek historie pravigebla. Tiu procedo rezultigas al germanaj oreloj tre malbele sonantajn formojn. La longa fermita kaj la mallonga fermita *ö* estas plej efike esperantigataj per *oj*, oni do diru ekz. Gojto (*Goethe*), nepre ne trisilabe Goeto, aŭ Geto, Goto. La mallonga fermita *ö* prefere fariĝu *o + j* en la posta silabo”, ekz. Kropkjo (*Kröpke*), la fama restoracio en Hanovero.

La tri *u*, longa fermita, mallonga fermita, mallonga malfermita, fariĝas en Eo *u*. Jam tio devus malpermesi, ke ankaŭ *ü* fariĝu *u*.

La tri *o*, longa fermita, mallonga fermita, mallonga malfermita, fariĝas en Eo *o*. Jam tio devus malpermesi, ke ankaŭ *ö* fariĝu *o*.

La ok nazaj monoftongoj koncernas pli la francan ol la germanan lingvon. Pri ili decidu francoj.

La tri diftongoj *ai/ei*, *äu/eu/oi* kaj *au* ŝajnas al mi senproblemaj kaj bone esperantigeblaj respektive per *aj*, *oj* kaj *aŭ*. Bedaŭrinde ofte troviĝas esperantigoj, kiuj ne sekvas tiun modelon. En PIV ekzemple troviĝas *Ejnstejn*, kio sonas tute fremda al germanaj oreloj kaj eĉ ne konservas la originan ortografion. Mi senhezite kaj nepre nur dirus Ajnŝtajno. El *Freud* en PIV fariĝis Freŭdo. Sed diftongo “eŭ” ne ekzistas en la germana. La esperantigo, konforme al la prononco, devas esti Frojdo. Kutimigi la okulojn al la ŝanĝita ortografio estas multe pli facile ol kutimigi la orelojn al la ŝanĝita prononco kaj poste ankaŭ mem uzi tiun ŝanĝitan prononcon. Ortografio estas helpilo por reprezenti paroladon. Lingvo prefere ne estu konservilo de ortografio. La angla nin avertu!

### 4. La germanaj konsonantoj

Ĉar mia skribmaŝino ne disponas pri la literaro de la Internacia Fonetika Asocio, la esperantigon de la germanaj konsonantoj montru plej oportune listo de praktikaj ekzemploj, deiranta ne de la germanaj fonemoj, sed de ilia prezentado per la germana ortografio.

#### 4.1. Plozivoj

*Plettenberg* / Pletenbergo; *Tondern* / Tonderno; *Carossa, Klarenbach* / Karoso, Klarenbaĥo; *Bernburg* / Bernburgo; *Dörenberg* / Dojrenbergo; *Gevelsberg* / Gevelsbergo

#### 4.2. Nazaloj

*Mauermann* / Maŭermano; *Nierstein* / Nirŝtajno; *Langenhof* / Langenhofo (en Eo-prononco disdubiĝo de la sono, do *n/g* kun silaba limo)

#### 4.3. Likvidoj

*Lemgo* / Lemgo; *Ruländer* / Rulendro

#### 4.4. Frikativoj

*Felsenthal, Philipp, Vogelsberg* / Felzentalo, Filipino, Fogelsbergo; *Vandale, Walburg* / Vandalo, Valburgo; *Dassel, Heißenbüttel* / Daselo, Hajsenbutjelo; *Saale* / Zalo; *Schulz* / Ŝulco; *Richard, Richelsdorf* / Rikardo, Riĥelsdorfo; *Bacharach* / Baĥaraĥo; *Jaspers* / Jasperzo; *Hendungen* / Hendungo

#### 4.5. Afrikatoj

*Pfaffenhain, Pfalz* / Pfaŝenhejmo, Palatinato; *Zaisenhausen, Ritzleben* / Cajzenhaŭzo, Riclebo.

## 5. Duoblaj konsonantoj

Duoblaj konsonantoj estas fremdaj al Eo krom tie, kie ili estiĝas per vortkunmetado, ekz. sen/nombra, lit/tuko. Ili postulas laŭsilaban disigan prononcon. Sed tio estas esperanta, ne esperantiga afero. La germanaj duoblaj konsonantoj fariĝas simplaj. Ekzemploj:

*Abbehausen* / Abehauzo; *Eddersheim* / Edershajmo; *Affinghausen* / Afinghaŭzo, Afingaŭzo; *Aggsbach* / Aksbaĥo; *Ekkehard* / Ekehardo; *Allenstein* / Alenŝtajno; *Emmendingen* / Emendingo; *Mennighüffen* / Menighufjo; *Oppenheim* / Openhajmo; *Kärner* / Kernero; *Mössingen* / Mosjingo; *Pottenstein* / Potenŝtajno.

Mi forte malkonsentas la konservadon de duoblaj konsonantoj ankaŭ ĉe radike unusilabaj virinnomoj, kiel faras ekzemple PIV. *Emma* mi esperantigus per Emino kaj *Anna* per Anino, kaj certe nek per *Emma* kaj *Anna* nek per *Ema* kaj *Ana*. La kaloĉaja adjektivigo de virinnomoj estas, se eble ne kontraŭ-fundamenta, tamen sofisma.

## 6. Eblecoj por beletra (ne sciencfaka!) tradukado

Se la lasta vorto en kunmetitaj onomastikaĵoj havas klare rekoneblan signifon, estas ofte rekomendinde traduki ĝin. Tio faciligas memori ilin kaj instigas la imagon de la konsumantoj. Tiaj vortoj estas ekz. en *Bach, Berg, Dorf, Fels, Furt, Heim, Kirche(n), Land, See, Stadt, Stein*, en Eo: rojo, monto, vilaĝo, roko, vadejo, hejmo, kirko, lando, lago, urbo, ŝtono. Ekzemploj: *Ambach* / Amrojo; *Herzberg* / Hercmonto aŭ eĉ Kormonto; *Heinzendorf* / Hajncenvilaĝo; *Stolzenfels* / Ŝtolcenroko; *Schweinfurt* / Ŝvajnvadejo aŭ eĉ Porkovadejo; *Hildesheim* / Hildeshejmo; *Holzkirchen* / Holckirko aŭ eĉ Lignokirko; *Walchensee* / Valhenlago; *Duderstadt* / Duderurbo; *Allenstein* / Alenŝtono. Tiun procedon oni pli bone evitas, se temas pri internacie konataj nomoj, do ne Dujselvilaĝo, sed Dujseldorfo, ĉar tiu urbego ne plu estas vilaĝo, ne Frankvadejo, sed Frankfurto, ĉar la vadejon forviŝis la tempo.

La germana vortparto *-hausen* signifas ion kiel lokon, kie oni loĝas, loĝejon, domaron. Eblas do ankaŭ esperantigi ekz. *Sachsenhause* per Saksoloĝejo aŭ Saksodomaro, *Münchhausen* ne nur per Munĥhaŭzeno, sed ankaŭ per Monaĥloĝejo aŭ Monaĥdomaro.

La protagoniston de la mondfame konata populara libro pri *Eulenspiegel* oni nepre esperantigu per Strigospegulo kaj ne per Ojlenpigelo, ĉar strigo

kaj spegulo estas liaj emblemoj. Jam la humanistoj kaj multaj aliaj tradukis lian nomon: *NOCTUAE SPECULUM, VLVLARUM SPECVLVM, Owlglass* k.a.

## 7. Epiloga resumo:

Mi ne estas tre kontenta pri tio, kion mi skribis. La afero estas tro komplika kaj multafaceta por ĝin trakti en malmultaj paĝoj. La tasko, kiun la esperantistaro devas plenumi, estas giganta, ja sizifa. Kaj tamen la homaro ne nur bezonas internacian lingvon, ĝi ankaŭ bezonas internacian nomenklaturon de onomastikaĵoj. Kion ni faru? Unue mi dirus, ke ni havu paciencon, multan paciencon, paciencon ankaŭ pri mallertaj esperantigoj. Ili ne endanĝerigas la lingvon kaj malaperos, kiam pli bonaj formoj estos prezentiĝintaj. Sed pacienci ne signifas, ke ni simple lasu sinki la manojn. Ni do esperantigu ĉie kaj ĉiam, kie kaj kiam ni estas sufiĉe spertaj por tion fari. Nur se ekzistas esperantigitaj propraj nomoj en libroj kaj revuoj, ili iun tagon ankaŭ eniros en la PIVojn, mi volas diri en la vortarojn. Jam ekzistas presitaj kolektoj de propraj nomoj. Iom post iom ili ampleksiĝos kaj fariĝos la ne plu malhaveblaj laboriloj de ĉiu Esperanto-verkisto kaj redaktoro. Ni ne kontraŭstaru la evoluon. Ni prudente, eble malrapide, sed nelacigeble helpu antaŭenigi ĝin. Ni staras ankoraŭ je la komenco. Antaŭ ni la horizontoj estas vastaj. Eke!

### Jen kvindek personaj nomoj nove esperantigitaj:

<i>Adenauer, Konrad</i>	Adenaŭro, Konrado
<i>Arndt, Ernst Moritz</i>	Arnto, Ernesto Maŭrico
<i>Backhaus, Wilhelm</i>	Bakhaŭzo, Vilhelmo
<i>Behring, Emil von</i>	Beringo, Emilo De
<i>Bismarck, Otto von</i>	Bismarko, Oto De
<i>Brentano, Clemens</i>	Brentano, Klemento
<i>Bürger, Gottfried August</i>	Burgjero, Diopaco Aŭgusto
<i>Claudius, Matthias</i>	Klaŭdio, Mateo
<i>Dauthendey, Max</i>	Daŭtendajo, Makso
<i>Dürrenmatt, Friedrich</i>	Dujrenmato, Frederiko
<i>Egk, Werner</i>	Eko, Vernero
<i>Euler, Leonhard</i>	Ojlero, Leonhardo
<i>Fichte, Johann Gottlieb</i>	Fiĥto, Johano Gotlibo
<i>Fontane, Theodor</i>	Fontano, Teodoro
<i>Frisch, Max</i>	Friŝo, Makso
<i>George, Stefan</i>	Georgo, Ŝtefano

<i>Grabbe, Christian Dietrich</i>	Grabo, Kristiano Ditriffo
<i>Händel, Georg Friedrich</i>	Hendelo, Georgo Frederiko
<i>Hochhuth, Rolf</i>	Hoĥhuto, Rolfo
<i>Kaiser, Georg</i>	Kajzero, Georgo
<i>Keller, Gottfried</i>	Kelero, Diopaco
<i>Kokoschka, Oskar</i>	Kokoŝko, Oskaro
<i>Kotzebue, August von</i>	Kocebuo, Aŭgusto De
<i>Langgässer, Elisabeth</i>	Langesro, Elizabetino
<i>Liliencron, Detlev von</i>	Liljenkrono, Detlevo De
<i>Luther, Martin</i>	Lutro, Marteno
<i>May, Karl</i>	Majo, Karlo
<i>Modersohn, Otto</i>	Moderzono, Oto
<i>Mörke, Eduard</i>	Mojriko, Eduardo
<i>Nolde, Emil</i>	Noldo, Emilo
<i>Orff, Carl</i>	Orfo, Karlo
<i>Pfitzner, Hans</i>	Pficnero, Hanzo
<i>Porsche, Ferdinand</i>	Porŝo, Ferdinando
<i>Rauch, Christian Daniel</i>	Raŭfo, Kristiano Danielo
<i>Rilke, Rainer Maria</i>	Rilko, Rajnero Mario
<i>Runge, Philipp Otto</i>	Rungo, Filipino Oto
<i>Sachs, Hans</i>	Sakso, Hanzo
<i>Schopenhauer, Arthur</i>	Ŝopenhaŭro, Arturo
<i>Schweitzer, Albert</i>	Ŝvajcero, Alberto
<i>Siemens, Werner von</i>	Zimenco, Vernero De
<i>Spitteler, Carl</i>	Ŝpitelero, Karlo
<i>Strauß, Franz Joseph</i>	Ŝtraŭso, Franco Jozefo
<i>Stresemann, Gustav</i>	Ŝtrezemano, Gustavo
<i>Treitschke, Heinrich von</i>	Trajĉko, Henriko De
<i>Valentin, Karl</i>	Valenteno, Karlo
<i>Vischer, Friedrich Theodor</i>	Fiŝero, Frederiko Teodoro
<i>Wedekind, Frank</i>	Vedekindo, Franko
<i>Winckelmann, Johann Joachim</i>	Vinkelmano, Johano Joakimo
<i>Zinzerdorf, Nikolaus Ludwig</i>	Cincendorfo, Nikolao Ludoviko

## **Vorläufige Regeln für die Esperantisierung deutscher Eigennamen**

### **Vorbemerkung**

Dem Verfasser sind auf dem Gebiete der Onomasiologie hinsichtlich seiner Kompetenz enge

Grenze gezogen. Richtschnur seiner Esperantisierungsvorschläge war bisher der Hinweis Samenpflanzens, daß die endgültige Form für die Schreibung von Namen ohne Zweifel die lautentsprechende sei (phonetische Orthographie). Er esperantisierete von Fall zu Fall und immer nur für einen gegebenen Zusammenhang, indem er die Namen als Individualitäten behandelte und nicht nach Verallgemeinerungen strebte.

### **Thesen**

Ausgangspunkt ist die Aussprache (T. Siebs, 1927: *Deutsche Aussprache/Hochsprache*. — Köln; *Der große Duden*, Band 6: *Aussprachewörterbuch*. 1962. — Mannheim). Die Rechtschreibung gibt Hilfestellung, wo die Aussprache allein keine befriedigenden Lösungen zuläßt. Sprachenenmpfindsame Formenscheidung hat den Vorrang gegenüber schematischen Verfahren. Wenn auf diese Weise mehrere Formen entstehen, wird die sprachliche Entwicklung die Auslese treffen. Damit hat es keine Eile.

### **Die Vokale**

Es gibt im Deutschen, ohne die acht eingebürgerten französischen Nasalvokale, 22 Monophthonge und drei Diphthonge. Im Esperanto werden die zwei A-Laute zu A, die fünf E-Laute, einschließlich des Umlautes Ā, zu E, die drei I-Laute zu I, die drei O-Laute zu O und die drei U-Laute zu U.

Eine besondere Schwierigkeit bieten die beiden Umlaute Ö und Ü. Sie sind durch Palatalisierung entstanden: drei Ö aus O+J und drei Ü aus U+J. Beispiel Colonia, Cologne, Köln. Es empfiehlt sich, sie durch analysierende Schreibweise wiederzugeben: Kolonjo. Das ergibt zugleich eine phonetische Annäherung.

Die drei Diphthonge machen keine Schwierigkeiten: AI oder EI werden zu AJ, ÄU oder EU oder OI werden zu OJ und AU wird zu AÜ.

### **Die Konsonanten**

Unverändert übernommen werden: P, T, K, B, D, G, M, N, L, R, J und H. Stimmloses F (PH, V) und stimmhaftes W (V) werden zu F, beziehungsweise V. Stimmloses S (ß, SS) wird zu S, stimmhaftes S wird zu Z. SCH wird zu Ŝ, CH (ich, ach) zu Ĥ oder eventuell K. PF bleibt oder wird eventuell P, und Z (TZ, TS) wird zu C.

### **Möglichkeiten für Übersetzung**

Namensbestandteile, deren Sinn klar ersichtlich ist (Bach, Berg, Dorf, Fels usw.) sollte man tunlichst übersetzen. Das erleichtert für den nichtdeutschen Leser oder Hörer das Verständnis, macht den Namen einprägsamer, z.B. statt Herbergo (Herzberg): Hercmonto oder sogar Kormonto. Schriftsteller haben so schon ihre Pseudonyme gebildet: Grenkamp (Kornfeld), Forĝisto (Schmidt), Brikisto (Ziegler) u.a.

### **Ausblick**

Das Ziel, einen reichhaltigen Schatz gut esperantisierter Eigennamen zu schaffen, ist beharrlich anzustreben.

### **Libroj de Rikardo Ŝulco, en kiuj la propraj nomoj estas esperantigitaj**

Richard Schulz: *Mein geliebtes Esperanto. Wege zum Verständnis und zur Praxis der Internationalen Sprache*. Tria eldono. — Bleicher Verlag, D-7016 Gerlingen. 1984.

Heinrich Böll: *La perdita honoro de iu Katarino Blum*. Trad. Rikardo Ŝulco. — Bleicher Verlag, D-7016 Gerlingen, 1978. Licenco eldono por la socialismaj landoj ĉe Edition Leipzig.

Richard Schulz: *Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus? Die Lösung des Sprachenproblems in den Ländern der Europäischen Gemeinschaften*. — Bleicher Verlag, D-7016 Gerlingen, 1979.

Kristiano Morgenŝterno: Pendumilaj Lidoj. Trad. Rikardo Ŝulco. - *Bleicher Verlag, D-7016 Gerlingen, 1980.*

Kristiano Morgenŝterno: Palmŝtrojmo. Trad. Rikardo Ŝulco. - Esperanto-Centro. *D-4790 Paderborn, 1983*

Felicitino Kukuko - Rikardo Ŝulco - Ernesto Ŝomero: *Die Posaunen von Jericho / La trombonoj de Jeriko.* Dulingva eldono. - Esperanto-Centro, *D-4790 Paderborn, 1984.*

Rikardo Ŝulco: Vespero jam fariĝis. Agregajoj kaj robajoj. - Esperanto-Centro. *D-4790 Paderborn, 1985 (aperigota).*

Vestfaliaj Flugfolioj. - Responda eldonisto: R. Ŝulco.

## Noto de la redaktoro

Rikardo Ŝulco plenrajte riproĉetas, ke la prezentita traktaĵo ne fontis el lia propra iniciato, sed el "invito". Fakte li — pro sia komplezemo — ne kuraĝis rifuzi mian peton. Bonŝance; pri esperantigo de la germanaj onomastikaĵoj li ja estas fama spertulo, kies opiniojn oni konsideru precipe en la sfero beletra, sed ankaŭ ekster ĝi.

Kiom koncernas la sferon de sciencaj nomenklaturetoj, oni inklinas pli eble al kompromisoj inter la grafismo kaj fonetismo. La klara tendenco de nia aŭtoro al "prononcismaj" solvoj fojfoje kolizias kun internacia terminologia praktiko.

Ekz. la diftongo EŬ, kvankam ne germana, tamen estas vaste internacia. Jen kial en Esperanto akceptiĝis Eŭropo, ne "Ojropo" laŭ la germana, "Eropo" laŭ la franca, "Evropo" laŭ la ĉeĥa, "Jevropo" laŭ la rusa prononcoj. Simile do Eŭgeno, freŭdismo k.t.p.

Analoge la germana *EI* fariĝas en Esperanto *EJ*, ne *AJ* (Rejno, Ejnŝtejno, -hejmo). Cetere, kvankam mi absolute ne kompetentas enmiksiĝi en la germanan ortoepion, mi klare aŭdis el pluraj germanaj buŝoj siaspecan sonon inter *AJ* kaj *EJ* en la vortoj skribitaj per *EI*. Krome, mi legis en *Etymologisches Wörterbuch der deutschen Sprache (F. Kluge 1910)*, ke la numeralo *ein* oldsakse sonis *ên* (kp. la nederlandan *een*).

La tutmonda publiko perceptas prefere grafismon ol fonetismon. Tiom pli eble la principo validas por la publikoj esperantista kaj sciencista.

La beletristo Ŝulco kredas, ke la venonta lingvoevoluo serĉos kaj trovos taŭgajn solvojn. Fakuloj okupiĝantaj pri lingvonormigado eble deziros iomete modifi tiun ĉi tolereman tezon. Mi invitas precipe germanojn, ke ili kontribuu per siaj opinioj, kiujn mi volonte publikigos en proksima esperantologia kajero de SR.

*J. Kavka*

## Problemoj de esperantigo de nederland- (lingv)aj loknomoj

*Wouter F. Pilger (Nederlando)\**

### 1. Ĝeneralajoj

#### 1.1. Enkonduko

Kiel elokvente montrite de *Kavka (1978, 1980, 1981)*, ekzistas okazoj, kiam loknomoj en internacilingva teksto devas ekhavi internacilingvan formon. Mi nur aldonu, ke plejmulta edama fromaĝo ne devenas de *Edam*, ke lejdena botelo ne estas botelo el *Leiden*. Kaj ke mastriĥta kalkoŝtono troviĝas ankaŭ ĉe *Valkenburg*. Esprimoj kiaj: "la fromaĝo de *Edam* de *Hoorn* malpli bone gustas ol la fromaĝo de *Edam* de *Schagen*" aŭ "La kalkoŝtono de *Maastricht* de *Valkenburg*" estas neakcepteblaj. Formoj kiel "*Maastricht-a*" kaj "*Leiden-a*" povas sufiĉi optike, sed ili estas neproneceblaj. Ne nur ĉar scio pri la nederlandaj ortografio kaj prononco mankas, sed ankaŭ ĉar la ŝanĝita vortakcento ofte simple malebligas la originan prononcon. Pro la fonetikaj proprajoj de la nederlanda lingvo, esperantigo de nederlandlingvaj loknomoj estas multe pli komplika ol tiu de, ekz. ĉeĥaj. Tamen pluraj esperantigitaj loknomoj estas uzataj, kaj el tiuj oni povas dedukti manierojn por taŭga esperantigo de pluaj nomoj de lokoj en Nederlando kaj nederlandlingva Belgio (alivorte: Flandrio).

Ekzistas diverskiala kontraŭstaro pri asimilado de (lok)nomoj. Kutime ne pri fremdlandaj, sed ĉefe pri "sialandaj" nomoj. Tamen oni konsideru la bezonojn de alilandaj personoj dezirantaj priparoli ankaŭ nederlandajn kaj flandrajn specialaĵojn! Instrui al ili la prononcon de la nederlanda (... kaj almenaŭ kelkcent aliaj lingvoj - ĉar tio estas la konsekvenco de kontraŭasimilismo, ekz. *Seppik 1974*), ne havas sencon. Havigi al ili imagon pri la nomoj en la kadroj de la Esperanto-fonetiko, laŭ mi estas la plej bona solvo.

\* Redaktoro en eldonejo de lernolibroj, *Leeckerhoek 26, NL-82223 25 LELYSTAD.*